# EKO 2025

**Esperanto: lingvo kiu ligas**

EKO 2025-26. Junio 20. Pezo: 550 KB, Sen alkroĉaĵo.

## Edukado.net aktivos en Brno

Por ĉiu kiu partoprenos la kongreson en Brno! Ĉu vi havas interesan hobion aŭ profesion? Jen la okazo paroli pri ĝi! Edukado.net lanĉos novan programon dum la kongreso kaj esperas krei tradicion. Ni organizas Fakan Angulon, en kiu ni ebligos spert-interŝanĝojn, interkonigos homojn ne nur en kampo de Esperanto, sed precipe kadre de iliaj hobiaj kaj profesia lertoj.

Ĉiu partoprenanto prezentos al grupeto eron de sia profesio, hobio, eltrovaĵo, arto …

Ni celas havi prezentadojn ekz. pri librobindado, ŝminkado, bierfarado, silkopentrado, panbakado, stenografio, farado de vitralo ktp. La programo baziĝas sur ekvilibra interŝanĝo, kie nur tiuj ricevas, kiuj ankaŭ donas. Tio signifas, ke el la 20 partoprenontoj, ĉiu estos kaj "publiko" kaj prezentanto.

Katalin Kovats

## Vinilkosme kaj Feste


FESTO
MOISSAC 17–24 AUGŬSTO 2025
**FESTO revenas!**
FESTO 2025
Post multege da jaroj (ĉu ne jam dek?!), FESTO, la somera junulara renkontiĝo de JEFO denove okazos!
EUROKKA partneradas kun JEFO por organizi buntegan vesperan programon.
Koncertos Platano, Vojaĝo, JoMo, Gijom, Kaj Tiel Plu, Tifen, Melono!
Malkovru la tutan programon ĉe nia blogo

Ni nin revidu dum FESTO!

Jen la informletero de Vinilkosmo en kiu aperas muziknovaĵoj, artikolo pri FESTO 2025
https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo/431-informletero-de-vinilkosmo-n-ro-54-junio-2025.html

La EUROKKA-Vinilkosmo teamo

La muzika platformo de Vinilkosmo:
https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/
La ABONKLUBO de VK:
https://frama.link/abonklubo
La Blogo de VK: https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo.html
VK ĉe *facebook* : https://www.facebook.com/groups/VINILKOSMO/
Wikipedia: https://fr.wikipedia.org/wiki/Vinilkosmo

Feri Floro kantas sian novan registritan version de "Elizabet' " "Maria Isabel", tradukitan de Liven Dek, filmaranĝo de Javier Romero Tello.
https://youtu.be/sXO3VWCVBWM

mga




## Brazila muziko

Tio ĉi estas kanto de komponisto ne antaŭe publikigita en nia retejo, nome **Luiz Melodia**. La kanto estas Gejunuloj deviintaj (originale *Juventude transviada*):

## Reeĥoj pro la forpaso de Karlo Pov

Koran dankon pro la kondolencoj kaj via apogo en tiuj malfacilaj tagoj! Mi dronas en la oceano de la usona burokratio. Mi ŝatus krei fonduson enkadre de UEA omaĝe al Karlo kun mono de lia vivasekuro. Kiel vi scias li tradukis kaj verkis en sia juneco, eĉ estis la unua kasisto de EVA! Mia ideo estas uzi la monon por disdoni unikajn premiojn en la literatura fako ekster la Belartaj Konkursoj: ekzemple aljuĝi al juna verkisto; aŭ pro traduko (la aĝo de la tradukisto ne gravus), aŭ eble iu alia.

Daniela Power

Jen vortoj de la direktoro de UEA: Mi dankas pro via mesaĝo kaj via ideo krei fonduson memore al via edzo Charles Power. Mi bezonus pli da informoj kaj detaloj por paroli kun la Estraro. Devus esti klare, kiom alta estu la komenca kapitalo (ĝi devus kovri minimume 5 jarojn), kiuj devus aljuĝi la premiojn (kiuj do estu en la komisiono, kiu decidas pri la koncerna premio). Kompreneble UEA povus serĉi personojn, kiuj formas parton de komisiono.  Gravus scii kion ekzakte oni premios kaj kiel oni kandidatiĝu.

## Aktivula kunsido en Herzberg




Komence de junio okazas en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo - la aktivula semajnfino kun la asocia konsilantaro de GEA. La kunsidejo estas la Kavalira Salono de la Welf-kastelo, la programo por la delegitoj enhavas pritraktadon de aktualaj movadaj aferoj, diskutadon pri planoj, agadoj, viziton de la Esperanto-ekspozicio pri Maks kaj Morits (fama germana literatura verko) kaj urborigardadon.

Raporto de Zsófia Kóródy

## Regularo konkurso Ĝanfranko 2025

Por omaĝi Gianfranco Molle, la plej fama itala kantisto, tutmonde konata, animo de *Muzika Kulturo*,  la itala federacio IEF organizas konkurson pri kanzonoj originale verkitaj en Esperanto. La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn.
La rezultoj estos anoncitaj en la itala kongreso. Oni rajtas konkursi per maksimume tri verkoj, kiuj devas esti neniam antaŭe eldonitaj. Maksimuma daŭro de kanzono estas 5 minutoj. La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso dum la sekvaj tri jaroj. La konkursaĵojn oni sendu al la sekretario, Valerio Dalla, per mesaĝo, al la adreso concorso@esperanto.it indikante la pseŭdonomon kaj

veran nomon kaj adreson; ili estu kantitaj kaj luditaj en aŭda formato mp3 aŭ ogg, kaj skribitaj (nur vortoj, eventuale kun akordoj) en teksta formato doc aŭ odt.

La gajninto de la unua premio ricevos monpremion de € 200; por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj KD-oj. La limdato por la sendado estas la 30-a de junio. Juĝkomisiono: prezidanto: Laura Brazzabeni, sekretario Valerio Dalla, juĝantoj: Pierluigi Cinquantini, Martin Wiese, Flo Martorell. La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio. La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo.
Por pliaj informoj : concorso@esperanto.it FEI, concorso, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italio

Prof. LAURA BRAZZABENI/ Presidente FEI, +393286461063 (ankaŭ WHATSAPP)

## Monda Tago de Naturmedio

En la 5-a de junio estis urĝa alvoko al konscio kaj respondeco. Fronte al defioj, kiuj minacas la vivon sur la planedo, estas tempo pripensi niajn kutimojn, niajn elektojn kaj la efikon, kiun ni havas sur la mondon. En sia artikolo *Krimo pro malŝparado*, la verkisto Paiva Netto atentigas: *"Estas urĝe haltigi malŝparadon. Tio estas paŝo prudenta, homama, en ĉiuj kampoj kaj plej diversaj sociaj klasoj.* Prizorgi la medion signifas prizorgi la propran vivon. Ĉiu ago gravas. Pripensi, redukti, reuzi kaj transformi estas agoj, kiuj konstruas pli justan, solidaran kaj daŭrigeblan estontecon por ĉiuj.

**Ligo de Bonvolo el Brazilo**

## Survoje al la pola kongreso

Polaj esperantistoj kongresos en urbo, kiun neniu malpolo kapablas ĝuste prononci
La 42-a Pola Esperanto-Kongreso okazos de la 21-a ĝis la 24-a de aŭgusto en Piotrków Trybunalski, en la centro de Pollando. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2025/06/polujo-28/.

## Kulture en Ĉinio – ILEI salutas

Fine de majo, kun tri kolegoj kaj du studentinoj de la Esperanto-fako ĉe Zaozhuang-a Universitato, mi unuafoje veturis al la ĉarma urbeto Tonglu de Zhejiang-provinco. La Tonglu-a Esperanto Ligo fondiĝis en la okdekaj jaroj kaj nun festis sian kvardekjariĝon per la bele organizita dutaga evento "Zhejiang-a Kultura Esperanta Festivalo kaj Akademiaj Interŝanĝoj". Partoprenis en ĝi pli ol 90 samideanoj el la tuta Ĉinio, inkluzive de multaj estroj de lokaj asocioj kaj de la vicprezidanto de internacia IKEF, Zhang Cheng Hua. Aparta plezuro por mi estis povi saluti nome de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, ankaŭ ĉar niaj kolegoj multnombris en la publiko, kiu plenigis la salonon, atente aŭskultis kaj varme respondis. Inter la tre aktivaj, verde vestitaj volontuloj, certe memorindas la kvar gestudentoj de Zhejiang-a Komunika Universitato, kiuj donis grandan kontribuon al la programo. La du junuloj prezentis sian povan legadon de verko de la fama esperantista literaturisto Lusin (Lu Xun, 1881-1936), kiu gajnigis al ili la unuan premion en la unua "Deklama Konkurso" organizita de Ĉina Esperanto-Ligo. La du junulinoj entuziasme prezentis siajn viglajn agadojn en Esperantujo, komencitajn sub la gvido de la juna profesorino Ĉielia (Zhu Xueli), iama studentino de S-ro Semio en Zaozhuang-a Universitato.

Alessandra Madella, Ĉinio

## Detale pri la BET-programo

La 5-an de junio, precize unu monaton antaŭ la malfermo de **BET-59,** kiu okazos en Kaŭno. Litovio, aperis Informilo n-ro 2. Ĝi enhavas informojn pri la BET-ejo, trafiko, loĝado, manĝado, ekskursoj kaj aliaj aspektoj de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Legu ĝin en *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/06/bet-196/

## Laste aperis de ILEI

Nia instruista ligo eldonas du valorajn revuojn: la propra organo *Internacia Pedagogia Revuo* kaj la instiga revuo *Juna amiko*, por junuloj kaj novaj lernantoj. En majo kaj junio aperis nova eldono de ambaŭ abonindaj gazetoj.







## UEA pesas siajn atingojn

En la komitata teko vi povas trovi la spezokonton kaj la bilancon 2024.
https://uea.org/l/teko/komitataj/Spezokonto_de_UEA_2024.pdf
https://uea.org/l/teko/komitataj/Bilanco_de_UEA_2024.pdf

Se vi ne rekte sukcesas preni, bv. viziti: https://uea.org/teko/komitato

Mi ĝojas prezenti al vi denove tre pozitivan rezulton. Ĉefaj kaŭzoj estas la ege bona rezulto ĉe la moninvestoj kaj la administra subvencio de Eŭropa Unio. La financa stato de UEA pliboniĝis ankaŭ bilance. Ĉe la rezervoj troviĝas du kapitaloj, kiuj transformiĝas en fondaĵojn en 2025. "Huttunen" havos la celon "edukado" kaj la rezervo "Enderby" helpos al agadoj por "Homaj Rajtoj". La bilanco enhavos monon, kiu rilatas al EU-subvencioj. Tio fortigos la agadon de UEA.

Speciale mi ŝatus mencii, ke multaj membroj kontribuis al la sukceso de la UK en Aruŝa. Tio nur eblis danke al la granda donacemo por financi la kongreson kaj la venigon de multaj afrikanoj al ĝi. Ni konsciu, ke UEA daŭre havas multajn defiojn. Mankas detale analizi sur kiuj kampoj ni povas fortigi la asocion kaj kiujn agadojn ni entreprenu. Zorgiga estas la libroservo. Daŭre ni ne trovis solvon por ĝi. La vendo de la domo ankoraŭ ne okazis, ĉar nuntempe ni povus vendi ĝin nur je relative malalta prezo. Ekzistas la espero, ke la vendo-merkato en Nederlando kun reduktiĝantaj rentoj pliboniĝas. Indas atendi ĉar vendo kun tro reduktita prezo ne taŭgas.

Martin Schaeffer, Ĝenerala Direktoro de UEA

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

### Dudek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.